# Nuba koŝmaro

*Rita RÖSSLER-BUCKEL*

Nukleaj centraloj bezonas instalaĵojn por forigi la neutiligeblan varmon dum la energion produktanta atoma proceso. Foje sufiĉas la situado apud rivero, lago aŭ maro por havi la necesan kvanton da akvo, forkondukantan la troan varmon. Sed, okaze de malmulta akvo dum certaj sezonoj, oni bezonas grandan surfacon por malvarmigi la akvon, kiu poste kun pli malaltaj temperaturoj reiras en la ciklon. Tial ofte troviĝas apude "malvarmiga turo", kies grandega interna surfaco reduktas efike la akvovarmecon. Ne la tuta akvokvanto povas reiri en la ciklon. Parto vaporiĝas kaj leviĝas kiel blanka nubo en la ĉielon.


La aspekto de tia nuboproduktado por la regionanoj estas konata kaj ne kaŭzas cerbumadon, almenaŭ ne tiam, kiam la nubo leviĝas blanka kiel la de Dio bonvole akceptita ofernubo de la biblia Habelo. Sed kiam ĝia senkulpa blanka koloro nekutime transformiĝas al minaca nigreco kiel la oferaĵo de Kaino, la homoj timigite rigardas al la ĉielo. Des pli, se samtempe alialoke atomcentraloj plene senregiĝis, kiel en la japana Fukuŝimo, kaj la konsekvencoj estas dum semajnoj televideblaj ĉie en la mondo.

Tiel okazis en la regiono ĉirkaŭ la atomcentralo *Philippsburg* kun du energifontoj, unu jam tre malnova kaj eble malsekura. Iun printempan posttagmezon, kiam pro la tiam malmulta akvo de la rivero Rejno funkciis la malvarmigaj turoj kaj nur devus leviĝi pure blanka nubaro el la kamenegoj en la maje bluan ĉielon, tie aperis subite nigraj nubokusenoj. Ili rapide densiĝis kaj elformis profunde nigran elhaladzaĵon, kiu evidente intencis skribi menetekelon en la pace forsonĝiĝantan vesperĉielon.

Sentemaj homoj surstrate aludis inter si Fukuŝimon kaj komentis, ke, kaze de avario en la najbareco, la tuta regiono estos forlasenda, reveno neniam plu ebla. Kaj ke tio baldaŭ povus okazi. La radio kaj la televido tamen ne anoncis averton. Telefonalvoko ĉe la regiona fajrobrigado finfine havigis klarecon. Ne eksplodis la apuda atomcentralo, sed incendiĝis en apuda vilaĝo stokegejo de



gumaj produktoj. Ties nigrega fumo invitis al la kredo je katastrofo. Trankviliĝis la koŝmaroj de la lokanoj, kiuj tamen ne estis senpripense panikaj. Intertempe pro la publika premo post Fukuŝimo, la kristan-demokrata plus liberala germana registaro, nur mallonge antaŭe pludaŭriginta la funkciadon de la germanaj atomcentraloj,




**Bildo 1** : Blanka nubo nenuklea

decidis denove esplori ties sekurecon kaj la kapaciton de la senatomaj energifontoj de la lando. Kaj mirige evidentiĝis, ke, laŭ la aserto de rapide instalita "etika komisio", post 2022 Germanio ne plu bezonos atoman elektron.

Estas evidente, ke la nuna konservativa-liberala registaro provas reagi al la timoj de parto de la popolo kaj respondi al la ĝenerala etoso de la transformiĝanta socio. Tial ĝi mem efektivigas la konceptojn de la verdula partio kaj provas eksfunkciigi paŝon post paŝo la atomfabrikojn dum fidinda tempokadro. Ĉu la decidoj estas raciaj, ĉu en situacio, kiam oni eĉ tute ne scias, kie deponi la radiantajn postlasaĵojn de la pasintaj jardekoj, oni arbitre mallongigas la funkciadon de bone produktantaj centraloj, tion la ordinara popolo ne volas egaldistance konsideri kaj tion ankaŭ ne povas, ĉar danĝera situacio preskaŭ nesolveble ekzistadas kaj la daŭrotempoj de homoj kaj nuklea radiado estas tro malsimilaj, do ne kunordigeblaj. Bele, poste la publiko ne plu devas timi nigrajn nubojn el *Philippsburg* kaj similaj instalaĵoj. Sed kelkaj homoj

ĉiam ankoraŭ memoras, ke ili iam sidis agrable kaj kontente vespere en varma orienta vento, kiu, ne nigre kaj ne konstateble, transportis trans miloj de kilometroj el Ĉernobilo nuklee kontaĝan aeron okcidenten.



**Bildo 2** : Ĉu nuklea katastrofo?
(ambaŭ bildojn fotis la aŭtorino)

Por germanaj bonvolemuloj ja estos kontentige kredi, ke ilia lando estas sennuklea. Sed ili tute ne volas konsideri, ke ĉirkaŭ ili, mallongadistance al la propraj landlimoj, nehalteble kreskas la radia arbaro de atomaj centraloj, kamentuboj kaj malsekuraj deponejoj. Tiu industrio jam ĝojas liveri sian radian elektron al la senradia Germanujo, kaj jam scias, ke okaze de avario la sennuklea najbaro same suferos.

**Adreso de la aŭtoro**
*Rita RÖSSLER-BUCKEL*
*Am Mönchsbusch 6*
*DE – 67373 Dudenhofen* / GERMANUJO
<rozsas@web.de>

**Priaŭtora informo**

La aŭtorino, profesia muzikinstruistino, desegnas, pentras, fotas kaj utiligas kadre de sia artmetio nuntempajn elektronikajn rimedojn. Pli ol cent naciaj kaj internaciaj ekspozicioj agnoskas ŝian verkadon.



# La plureco de la plantonomoj
## – Respeguliĝo de la biodiverseco vegetala –

*Maria BUTAN*

**Resumo**

La surpriza riĉeco de la terminoj, kiuj nomas la plantojn, instigis nin analizi (pri aro hazarde elektita el la spontana flaŭro) unuflanke la reciprokan influon inter la scienca kaj la popola nomado kaj, aliflanke, la morfologiajn elementojn aŭ la fiziologiajn detalojn, kiuj gvidis al la elekto de iu aŭ alia nomo en la rumana kaj la franca lingvoj. Ŝajnis al ni interese substreki la ekziston en la franca de intera kategorio inter la scienca nomo latina kaj la ĉiutaga. Fine, ni cedis al la tento de la onomastiko, kaj ni konsideris oportuna proponi la terminon "fitonimo" – tiel por la komunuzaj kiel por la sciencaj nomoj de protektataj plantoj.

**Enkonduko**

La vegetala komponanto de la medio alprenas multegon da formoj. La biodiverseco kun siaj periodoj de multiĝo, de stagnado aŭ de malpliiĝo retroveblas respegulita same en la neatendita riĉeco de la terminoj kiuj signas la plantojn. Pro la fakto, ke ni renkontas ilin en ĉio kio ĉirkaŭas nin – en la spontana flaŭro, en la kultivejoj same en la ĝardenoj, kiujn ni kreas kaj ordigas sekvante celon – la plantoj ĉie ĉeestas.

Oni atribuis al ili multnombrajn nomojn kaj tio pruvas la fakton, ke la homo donacis al ili pli da atento ol al aliaj vivaĵoj. Kontraŭe al la ĉiam moviĝantaj bestoj, la plantoj povas esti kontemplataj. Se la bestoj lasas sin studi, precipe koncerne iliajn kutimojn, teniĝojn aŭ iliajn rilatojn kun la homo, la plantoj siavice staras senmove, atendas ĉiam en la sama loko ke la homo venu admiri ilin. La promenadoj en la naturo, celante plezuron aŭ motivitan kolektadon, rekompencas nin per multkolora, refreŝiga rikolto. Kiam oni sekvas la padojn, oni haltas ravitaj de la koloro de petaloj, de la svelteco de tigoj, de la beleco de formoj; oni povas strebi, kiel vera